


ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha XIX, Uralské nám. 9. — Redaktas dr. Stan. Kamarýt.



Ni salutas ĝoje kaj respektplene Klement Gottwald, elektitan la 14-an de junio prezidanto de la Respubliko Ĉeĥoslovaka. Li gvidos nin sur vojo al socialisma idealoj.

L. L. Zamenhof:

MODLITBA POD ZELENOU KOROUHVÍ

*Ty, tajemstvím halici podstatu svoji,
Ty, přemocný vesmíru králi,
Ty, pravdy a milosti bezedný zdroji
i života prameni stálý,*

*Ty, o němž sic představa bývává různá,
jež kdekdo z nás v srdci svém shodně však uzná,
ó tvůrce a vládce, teď vzhlížíme v nebe
a vzýváme Tebe!*

*Dnes v zápalu slepém se nepřem snad o to,
či národ má přednější práva,
zda lepší je vyznání ono či toto,
jen s r d c e nám víru svou dává.
A s ní, jež tak družně nás vespolek pojí,
s ní, výsostně pravou, ne v sváru a boji,
s ní k oltáři Tvému se stavíme nyní
my, zemi všech syní.*

*Rod lidský, jenž vrcholem Tvého je díla,
isa rozeštván nelne již k sobě,
vždyť národu národ jen útočně spílá,
druh na druhu vrhá se v zlobě.
Ó tajemný, bytostně neznámý duchu,
nechť modlitba vroucí Ti dolehne k sluchu:
kéž našemu navrátiš lidskému rodu
zas pokoj a shodu!*

*Nás přísaha víže: chcem napnout své síly,
ať lidstvo se v jednotu spojí.
Ty nedej nám klesnout, dej dospět nám k cíli
a zdolat, co v cestě nám stojí;
ó, požehnej všemu, oč sbor náš se snaží,
a vlevej nám posilu do našich paží,
ať každý z nás povždy je sdostatek smělý
a útokům čelí!*

*Svou korouhev zelenou hrdě chcem nésti,
jeť znamením dobra i krásna.
A tajemná Bytost nám dopřeje štěstí
tam dojit, kde meta je spasná.
My zboříme hradby, jež národy hati,
ty hradby se zhroutí a s rachotem zvrátí
a navždy jen láska i pravda pak všude
nám vládnouti bude!*

Z esperanta přeložil Miloš Lukáš.

KRONIKO ENLANDA

Ĉeĥoslovaka numero de la Interligilo, centra organo de fakinformoj, aperis en decembro 1947 kiel 9-12 numero de la 19-a jarkolekto. Redaktis ĝin Ferdinand Votrubec, nun jam bedaŭrinde mortinta. Ĝi estis lia lasta verko en lia fako. La listo de ĉeĥoslovakaj funkciuloj, kiuj kontribuis per artikoloj aŭ artikoletoj estas tre respektinda laŭ ilia aŭtoritateco kaj la enhavo de la tekstoj same. Ministroj Jan Masaryk, Václav Kopecký, Ivan Pietor, Frant Hála, Dr Kuška, prezidia ĉefo en la Informministerio, Josef Radvanovský, ĝenerala direktoro de ĉs. fervojoj, Dr Jaroslav Pipek, ĝenerala direktoro de ĉs. poŝtoj kontribuis per vortoj, kiuj ĉiuj meritas pripenson. Krome enestas en la kajero (16 paĝoj) kelkaj fakaj artikoloj: Sukceso de ĉeĥa fervoja dujarplano antaŭ cent jaroj (edr), La unua elsenda stacio en Dobrochov (Ing. K. Michalica), Glaciumdanĝero de la elektroteknika trafiko (Frant. Novák), Aŭskultu Ĉeĥoslovakion! (Adolf Malík), Sur la flugiloj (Ĉ. A.) kaj aliaj. La kajero tre bone reprezentas antaŭ internacia publiko la trafikan servon en Ĉeĥoslovakio.

Sinjorino Hana Benešová respondis al s-ino Julie Šupichová, kiu sendis al ŝi sian biografieton pri aŭtoro de Esperanto »Kdo je L. L. Zamenhof« per letero el 18-a de majo, kiu tekstas en traduko jene: »Tre ŝatata sinjorino instruistino, mi estis ĝojigita per Via afableco, kun kiu

Vi donacis al mi vian verkon pri vivo de Dro L. L. Zamenhof, nobla kaj modesta kreinto de Esperanto. Mi enprofundiĝis kun sincera intereso en tiun ĉi interesan biografian verketon kaj volonte mi ĝin enmetos en mian bibliotekon. Mi dankas Vin elkore pro la afabla rememoraĵo kaj kun deziro de multaj pluaj sukcesoj por Via agado mi Vin salutas sincere. Via Hana Benešová.

Gracoplena Jesu-infano de Praha estis temo de la sesa Radio-filmo prezentata de la Verda stacio la 7-an de junio je la 23,00—23,30 horo de somera MET. Ni gratulas al la proponantoj de la programoj, ĉar ili sukcesis trovi temon kun tute alia etoso ol la programoj antaŭaj. La tekston verkis Dr Frant. Kožík, tradukis Dr Tomáš Pumpr, adaptis Ant. Slanina. La rolantoj prezentis la tekstojn sur kutima nivelo de deklamarto. La muziko el ekleziaj melodioj signifis apartan tonon inter la Radio-programoj. La venonta arto-programo estos disaŭdigata lundon la 5-an de julio per stacioj Praha II, Morava, České Budějovice je la 23,00—24,00 horo kaj ĝi estos dediĉita al la Sokol-kongreso. Ne forgesu aŭskulti kaj konfirmi la aŭdon!

Haringoĉasado en la Norda maro estas instrua artikolo, verkita esperantlingve de J. Peters en Apeldorn kaj publikita ĉeĥlingve en la ĵurnalo Stráž severu 18. IV. 1948. El manuskripto ĝin tradukis s-o Lad. Blecha. Tre bona laboro.

NI LEGIS

Unu el la motivoj, kiu esperigas nin pri proksima fino de la militoj estas, ke la milito ĵus vastiĝis ĝis la tuta mondo kaj ke ĝi ne povas pli malproksimen iri, ĉar ronda estas la tero. Ankoraŭ pli ol en la timo pro la nova danĝero de la atombombo mi fidus por deturni la militon la komunan direkton de la viva disvolviĝo. — Tiel finas sian artikolon, aperintan france en „La Pensée“ kaj en Esperanto-traduko en „La esperantista laboristo“ el majo-junio 1948, glora fizikisto Paŭlo Langevin.

Vivanteco de Esperanto konsistas en tiu interna forto, kiu malhelpas la enkondukon de eĉ dezirindaj reformoj. Lingvo estas vivanta, same kiel organismo, se ĝi povas forĵeti ĉion, kio kontraŭus ĝian koheron kaj endanĝerigus ĝian tradicion. La vivantecon de la lingvo oni povas mezuri laŭ ĝia forto de inercio. Kaj la kontrasto estas vere frapanta inter unu Occidental, en kiun ĉiumonate diversaj akademianoj enkondukas pli malpli gravajn ŝanĝojn sen ia rezisto de la flanko de la uzantoj, kaj Esperanto, kies uzantoj sentas sin intime respondecaj pri ĝia kontinueco kaj stabileco. La historio de la ortografiaj reformoj, de la prepozicioj por la pasiv-aganto (da, par, baj, far ktp.) liverus valorajn dokumentojn pri tiu punkto, kaj tiele reliefus la unikan karakteron de Esperanto inter aliaj lingvoj internaciaj. (G. Waringhien en Literatura mondo, 5/6, p. 73.)

Pri supersignitaj literoj (vidu niajn paĝojn 31 kaj 50!) verkis artikolon Teo Jung en Heroldo de E. el 16. IV. 1948. Li raportas pri proponoj de Kubacki kaj Magnússon kaj pri novaj proponoj de Albert Lienhardt, E. P. Gasse, Dr F. Szilágyi, J. G. Casas, St. Horthyński. Ĉiu el ili proponas aliajn ŝanĝojn. Ankaŭ Teo Jung proponas sian sistemon:

ĉ = ch, ŝ = sh, ĵ = j, ĝ = dj, j = y (en diftongoj: i), ŭ = u, ĥ = k. Kiel ekzemploj estas donitaj propozicioj el Proverbaro:

Chiu tailoro havas sian tranchmanieron.

De ŝafo senlana ech lanero taugas.

Por hundon dronigi, oni nomas djin (aŭ jin) rabia.

Ĵeti polvon en la okulojn.

Al grandaj sinyoroj grandaj honoroj.

Ni trovas tiun proponon treege nepraktika. La nova aspekto de la vortoj estu malpli simila al la grafisma aspekto en romanidaj lingvoj ol en la kutima ortografio. Fonetikeco de la ortografio estas grava avantaĝo de Esperanto. Kaj presi oni tamen povas nian karan lingvon en amplekso tre sufiĉa; estis fabrikitaj tiom grandaj kvantoj da esperantlingvaj presaĵoj, ke oni ne povis ne sole disvendi ilin, sed ofte eĉ ne disdoni. Kial malfaciligi la lingvon sole por atendi pluajn aliĝontojn. Sed tiuj novaj aliĝontoj ne venos pro alia ortografio. Ili venos nur kiam ni kreas plurajn eblecojn de aplikado de nia lingvo. Kaj kial ne uzi la Zamenhofan proponon kun h, kiu estas tre facila por memori. Kaj legi ĝh kiel ĝ estas same strange kiel legi q = ĉ aŭ y = j. Ĝi estus strange ankaŭ por angloj, ĉar iliaj y pronancataj kiel j estas etimologie ĝustaj, sed en Esperanto ne.

Pri la afero skribis ankaŭ K. Kalocsay (en L. M. 5/6). Li estas konvinkita, ke „se Esperanto venkos, nenio malhelpos uzi la plej perfektan sistemon, t. e. la nuna“. Sed se nepre provizore estus bezone presi „sen ĉapeloj“, li proponas: ĉ = ch, ĝ = gh, ŝ = sh, ĵ = y, ĥ = kh, ŭ = w. Ekzemplo: Jene, parte sur la Zamenhofa bazo, oni provus trovi solvon, kiu ne tushas malgrable per la ekzotika aspekto de la tekstoj, kaj apenaw shanghas la latinidan ortografion. Mi estus tre felicha, se oni akceptus chi tiun solvon. Ĉar tiam kvietighus la ondarado de la akvo, chiu trankvilighus, kaj senprobleme uzus plu, mi yuras, tiun ekstermindajn chapelitajn literojn.“

Ni plene konsentas precipe kun la lasta frazo de eminenta verkisto. Kaj ni tre malĝojas pro la fakto, ke tiom longa kaj teda diskuto komenciĝis pro cirkulero de sin-

joro Kubacki, kvankam estis evidente, ke ilia aŭtoro ne scias la lingvon sufiĉe funde, ke li uzas argumentojn demagogiajn kaj ne verajn kaj ke li ne estas kapabla elpensi eĉ ete novan manieron por altiri al problemo de internacia lingvo unu novan seriozan kunlaboranton.

Tradukoj ĉe la Internacia Tribunalo en Hago. Dro Ivo Lapenna (Zagreb) funkciis en marto 1948 en proceso inter Granda Britujo kaj Albanio pro incidentoj en Krfo-kanalo (Korfu) kiel advokato-konsilisto de la Popola Respubliko Albanio. Demandite pri siaj spertoj koncerne uzon de la lingvoj, li respondis al redaktoro de Heroldo de Esperanto (laŭ n-ro el 16. IV. 1948): „La oficialaj lingvoj antaŭ la Internacia Juĝejo en Hago estas la franca kaj la angla. La partioj devas interkonsenti, ke nur en unu el tiuj lingvoj estu gvidata la proceso, sed en la aktuala proceso tio ne okazis. Tial estis uzataj samrajte ambaŭ lingvoj.“

Al la demando ĉu okazis miskomprenoj, dro Lapenna respondis:

„Tre multaj. Malgraŭ la fakto, ke la profesiaj tradukistoj, kiuj sendube bone konas ambaŭ lingvojn, ricevis anticipe la tekstojn de la paroladoj, tamen ili tre ofte faris erarojn. Vidante tion, mi devis tuj en la komenco atentigi niajn anglajn kontraŭulojn, ke la angla traduko ne plene respondas al la franca originalo. Mi persone ankoraŭ foje konvinkigis, ke nur la neŭtrala Internacia Lingvo prezentas veran solvon de la lingva haoso en la internaciaj rilatoj. Samtempe nur ĝi signifas veran egalcon de la partioj.“

Pri aktiveco de esperantistoj en sudamerikaj respublikoj ni legas en Rio Esperantista (februaro 1948). En Bolivio estis fondita nova centro en Cochabamba (Casilla Postal N-ro 562), boliviaj gazetoj la Patria kaj Diario de la Mañana en Oruro publikigis en januaro longajn intervjuojn pri nia movado. En Venezuelo fondiĝis en Caracas „Caracas Esperanto-Asocio“ la 2-an de februaro. En Ĉilo estas Esperanto instruata en du ŝtataj lernejoj. En Urugvajo kongreso de instruistoj akceptis rezolucion rekomendantan instruadon de Esperanto en la lernejoj.

Bulgara Esperantista Kooperativo aĉetis presejon kaj starigis propran librovendejon. Ĝi signifas pro tio gravan apogon de Internacia Kulturo, kiu estas depost januaro 1948 presata en tiu presejo, kaj por la tuta movado bulgara. La 28-an de marto 1948 ĝi okazigis sian jarkunvenon. Estis elektitaj Hr. Gavrilov prezidanto kaj Evstati Cifudov sekretario. (Aldono al Internacia Kulturo, nro 3.)

Esperanto en Sovetia zono en Germanio. En Dresden okazis kunveno de Dresdenaj esperantistoj la 11-an de aprilo. Ĉeestis ĉirkaŭ 250 personoj. La kunsidon prezidis s-ro Wachsmuth. S-o Knoll deklamis poemon de li verkitan kun titolo „Nova Espero“. La prezidanto raportis pri klopodoj de la estraro por forigi la malpermeson, kiu daŭris unu jaron, rilate la uzon de Esperanto. La kunveno estis konkreta atesto pri la forigo de la malpermeso. Poste okazis vigla diskuto pri farota laboro kaj oni elektis komisionon por ekzameni la proponojn kaj kunordigi laborprogramon. („Esperanto“, junio.)

Kiel mi vivas en la rusa zono de Germanio priskribas en longa letero en „La esperantista laboristo“ el majo-junio 1948 s-o L. Schodl, respondante tiel al iu anonima raportinto el la rusa zono, kiu raportis mensoge. Li laŭdas sistemon de manĝo-kuponoj, kiu kaŭzas, ke ĉiu ĉiam ricevas sian porcion eĉ se ĝi ne estas troa laŭ la kvanto. Grandan plibonigon signifis la ordono de la rusa komandanto, ke laboristoj en uzinoj ricevu tie tagmezmanĝon; tiel jam nun ricevas ĝin 1,116.000 gelaboristoj. „Serpentoj“ antaŭ la magazenoj ne ekzistas. La rusoj vidigis ankaŭ grandan talenton por organizi administron publikan sur novaj demokratiaj principoj. La komunistaj partio („kompartio“) tuj elpaŝis kun programo de rekonstruo: ĉiuj kampposedaĵoj de pli ol 100 ha estu senkompenso ekspropriataj kaj donataj al tiuj, kiuj povas la teron fakte kulturi, po 5—10 ha. Same la grandindustrio fariĝu komuna posedaĵo administrata de komunumoj, regionoj aŭ landoj. Ĉiuj militkrimuloj estu ekspropriataj! La aliaj tri partioj akceptis tiun programon. Kaj ĝi estas jam grandparte efektiva.

Pri la politika situacio la aŭtoro diras:

„Granda manko estas ĉe ni: preskaŭ ne ekzistas markistoj. Ilin la faŝistoj preskaŭ komplete ekstermis. Tiuj,

kiuj ankoraŭ vivas, grandparte profitis el elrado de aliaj nacioj — eĉ nevole — kaj komparas tiun tempon kun la nuna, cetere de ili mem kaŭzata, kaj obstine ne volas vidi la bonajn flankojn nunajn. — Nova altforno en popolpropra uzino „Maxmilianhütte“? — Ŝanĝo kaj plibonigo de karta sistemo? Ne interesas ilin. — 1,116.000 tagmezmanĝaĵoj ĉiutage en uzinoj? Ne interesas ilin. — La kritikantoj ja ne laboras en uzinoj, sed vivas per fikomercedo. Ili revas pri ukrainaj anseroj kaj grumbas pri malbonigo en „soveta regiono“. Postulu faktojn pri malbonigo! Demandu, kiamaniere ili agis dum Tria regno kontraŭ naziismo. Estu certa: ili respondas, ke tio ne estis ebla. Nun mi ebligis tion kaj centmiloj aliaj ankaŭ. Certe, ke mi vivas ankoraŭ, estas kvazaŭ miraklo. Sed tiuj, kiuj estis hontindaj timuloj kaj nur pensis pri si mem, nun ne malhelpu nian rekonstruon dissemante falsajn pesimismajn informojn pri malbonigo. Mi manĝadis brasikan supon en karceroj, mi travivis la bombtapiŝojn en Berlino, per kiuj ankaŭ mia hejmo cindriĝis, kaj neniam mi forgesos tion kaj ĉiujn aliajn fiagojn faŝistajn. Kaj por ke tiu tempo neniam revenu nek por ni nek por iu alia popolo, ni rigardu antaŭen kaj kunlaboru, rekonstruu!“ La vortoj ĝenerale tre pripensindaj.

La Asocio de nederlandaj scienculoj-esperantistoj kunvenis la 28-an de februaro en la astronomia observatorio en Utrecht. La prezidanto d-ro H. A. A. van der Lek malferme paroladis kaj emfazis la gravecon de konversacio en Esperanto por ĉiam doni pruvon, ke Esperanto vivas. Li emfazis, ke pruvo dependas ne de historia deveno sed de ĉiukampa aplikado de la lingvo. Post diskutoj pri organizaj aferoj Dro G. F. Makking prelegis pri Nomdonado en Esperanto al bestoj kaj plantoj. (Esperanto, majo.)

Rajton por Esperanto kaj lingvo hispana! La Montevideo gazeto „El Pais“ en sia numero de 29-a de Januaro 1948 informis, ke la Federacion Uruguaya del Magisterio (Urugvaja Federacio de Geinstruistoj) la antaŭan vesperon faris jenan decidon en formo de rezolucio:

„La urugvaja Federacio de Geinstruistoj esprimas la deziron, ke Esperanto estu akceptata oficiale de UNO kaj UNESCO kiel neŭtrala kaj facila lingvo, kun celo ke ĝi servu kiel helpa lingvo por faciligi la internaciajn interrilatojn kaj plifirmigi la ĉiuspecajn ligilojn inter ĉiuj popoloj, kaj kiel antaŭpuŝo por forigi la lingvajn barojn, kiuj dividas la homaron.“

„Dum ĉi tiu akcepto de Esperanto ne efektiviĝos, tiu ĉi Federacio postulas por la hispana lingvo, parolata de dudek nacioj, la nediskuteblan rajton figuri ĉiukaze inter la oficialaj lingvoj de ambaŭ universalaj institucioj.“ („Esperanto“, majo 1948.)

Kongreso de la Germana Esperanto-Asocio, unua postmilita, okazis dum pentekosto en München. Ĉeestis pli ol 1500 partoprenantoj, tial prave povas Heroldo de E. (10. VI. 1948) nomi ĝin „Triumf! Triumfo!“ Prezidis la kongreson Dr Siegfried Ziegler, prezidanto de GEa. En la varbkunveno sabaton la 15. V. parolis fremdlandaj esperantistoj franca SAT-ano Vannier, usona ĵurnalisto Sayers, oficisto de la militista registaro, angla samideano Mary C. Mayor el Londono, kortega konsilisto Hugo Steiner el Vieno. La Malferman kunsidon dimanĉan salutis eksterlandaj esperantistoj de 15 nacioj. El oficialuloj salutis la kongreson la ĉefurbestro D-ro Scharnagl, bavara ministro por edukado Dr Hundhammer (kiu finis sian salutparolon esperantlingve) kaj multaj aliaj ŝtataj kaj sociaj aŭtoritatoj. „Laŭdon meritas la diversaj organizoj, precipe la loĝigo kaj nutrado de tiom granda homamaso en detruita urbo. Por la germanoj, sciantaj la nutradajn cirkonstancojn, estas preskaŭ nekredible, ke la Munĉenanoj venkis tiun problemon. La tag-kaj vespermanĝoj en la „Grossküche“ [grandkuirejo] eĉ sen depreno de kuponoj estis bongustaj kaj ankaŭ sufiĉe satigaj; kompreneble ne estis donebla viando aŭ simila multkaloria nutraĵo. Tiuj, kiuj supozas, ke la favoro de la urbestro tion ebligis, verŝajne pravas.“ Tiel raportas H. J. en la citita numero de Heroldo de Esperanto.

El la raportoj meritas precipe esti enskribita tiu de ing. R. Jochman pri sinteno de bavaraĵ parlamentanoj: „Ni direktis kelkajn tagojn antaŭ nia kongreso personajn leterojn al ĉiuj parlamentanoj kun la peto sciigi al ni sian sintenon al Esperanto. La ankoraŭ ne finita pride-mando havis ĝis nun jenan rezulton:

Respondis el la 100 parlamentanoj de Kristana Socialista Unio 30, el 53 parlamentanoj de Socialdemokrata Partio de Germanio 31, el 12 parlamentanoj de Ekonomia Partio 7, kaj el 9 parlamentanoj de Liberdemokrata Partio 3. El ĉiuj parlamentanoj ĝis nun respondis 45%, el la ĝis nun venintaj respondoj estas 96% favoraj al Esperanto kaj nur 4% malfavoraj aŭ senkritikaj."

Dankleteron al niaj radiostacioj Praha, Ostrava kaj Hradec Králové sendis la Konferenco de la Okcident-sveda distrikto de Sveda Laborista Esperanto-Asocio, okazinta la 7-an de marto en Göteborg. (Laborista Esperantisto, Stockholm n-ro 4—5 1948.) Imitinde! (O. G.)

La batalo kaj la postmilita vivo de la ĉeĥa studentaro estis temo de esperanta parolado kiun prezentis (kiam?) Sava Heřman el Praha en la universitato de Sofia. Preparis ĝin la Studenta sekcio de la Esperanto-Societo „Maxim Gorkij“ en Sofia. Pri la sama temo parolis Heřman ankaŭ en la societa klubejo. (Aldro al Internacia Kulturo, Sofia, nro 3/1948.) (O. G.)

Buletin officiel du Centre National Esperanto-office, aperanta en ĵurnalformato kvaronjare en Orléans (2 rue de Vauquois), redaktata ekskluzive en la franca lingvo, estas senpage sendata al kelkaj miloj da adresoj de ne-esperantistoj. Ĝi estas tre bona maniero de propagando.

Esperanto-Lernanto. Monata informilo por vardo kaj perfektigo en la lingvo Esperanto. Eldonata kaj redaktata de I. Doderichs, Hannover-Hainholz, Postschliessfach 24. — Ni ricevis duan numeron el februaro 1948, 8 paĝoj, 15×21 cm. Germanlingvaj klarigoj pri gramatiko kaj iom da mallongaj tekstoj esperantlingvaj.

Tutmonda Interŝanĝa Adresaro (Praha, Břevnov 541) aperigis sian 7-an numeron (marto), 4 paĝoj 10×17 cm, kun 81 adresoj. Enpreso de adreso 12 Kčs aŭ 3 respond-kuponoj. Bela tipografia aranĝo.

Esti fiera pri sia propra racio estas bele. Sed pensi, ke la propra racio estas la plei bona en la mondo kaj ke ĝia procedanto tial estas la plei saĝaca, estas danĝere. Tiamaniere taksas sian racion aŭtoroj en Sennaciulo. Ili deklaras pri si, ke ili estas socialistoj. Ankaŭ ni estas socialistoj. La plej grava kontribuo, kiun donis al ni Marks, estas laŭ nia opinio konvinko, ke ankaŭ por socio estas troveblaj leĝoj analogaj al leĝoj de natursciencoj kaj troveblaj per la samaj induktaj metodoj. El tio rezultas respekto, kiun ni socialistoj devas havi koncerne faktojn. Kaj kiel oni povas nomi socialisto verkanton, kiu en decembra numero de Sennaciulo asertas: „La ĉeĥaj kaj slovakaj esperantistoj staras vizaĝ-al-vizaĝe kvazaŭ rabiaj hundoj“? Ni ja vivas apud la slovakaj esperantistoj, ni partoprenas reciproke niajn aranĝojn. Ĉu ni leginte ĝian aserton povas kredi en tiu gazeto aliajn asertojn, kiujn ni tamen ne povas tiom facile kontroli kiel rilatojn inter ĉeĥoj kaj slovakoj?

The British Esperantist aperas jam la 36-an jaron. Tio estas per si mem tre signifa fakto. Dum tiu ĉi jaro ĝi aperigas kalendaron dumoratajn po 20 paĝoj kaj kovrilo, ĉiam kun tre interesa enhavo (ĝrandparte anglalingva). El iarraporto pri 1947 de la The British Esperanto-Association Incorporated ni citu sumojn de la elspozoj sinsekve en jaroj 1945—1947 en Funtjoj: 2120, 2632, 2860. El la raporto ni citu prefere la akcenton, kiun ĝi donas al korespondaj kursoj, kiuj venigas konsiderindan nombron de novaj adeptoj de Esperanto. (B. E. 1948, marto-aprilo.)

Societo de Britaj Instruistoj-Esperantistoj okazigis sian jarkunvenon la 2—4-an de januaro 1948 en Londono. Ĝi havas 203 membrojn, inter kiuj 140 estas instruistoj profesiaj. La societo eldonas revuon por lernejoj „Nova espero“, kies 430 ekzempleroj estas mendataj. Prezidanto por 1948 estis elektita s-o E. G. Lock B. A. (Hemsworth). (Laŭ The British Esperantist, marto-aprilo.)

Aŭstria Esperanto-Revuo, oficiala organo de la aŭstria Esperanto-Movado (Vieno I, Neutorgasse 9) aperigas siajn numerojn en dikaj broŝurformaj kalendaroj tre impone aspektantaj. Numeroj 10—12 de la dua jarkolekto oktobro-decembro 1947 estas broŝuro 40-paĝa kun bela forta kovrilo. Enhavas detalan raporton pri la Aŭstria Esperanto-kongreso en Kufstein 17.—19. X. 1947. La reakcio de oficialuloj al la invitoj estis tre respektinda: Fakkunveno de la Laborista Frakcio partoprenis socialista eksministro Dro H. Frenzel, kiu salutis la kongreson esperantlingve kaj finis jene: „Aŭstrio nur estas lando mal-

granda, sed ĉiam ĝi estis la interliganta ponto inter la sudo kaj nordo, inter la oriento kaj okcidento. Ni aŭstriaĵoj esperantistoj promesas kunhelpi, ke baldaŭ ĉiuj popoloj povu uzi la ponton, por ke la paco inter ili fariĝu daŭra — per Esperanto.“ Korteĝa konsilanto Hugo Steiner transdonis al la kongreso la bondezirojn de la ŝtata kanceliero Dro ing. Figl kaj de la registaro. Ceestis 300 kongresanoj. La nombro per si mem estas pli ol kontentiga precipe se oni konsideras, ke la kongreso okazis en oktobro, kiam multaj jam ne disponas pri la ferioj.

„La bonŝanca domo en Leningrado“ estas kortuŝa novelo de iama korespondanto de New York Times Walter Duranty, aperinta en traduko de G. Saville en Literatura Mondo (majo-junio). La traduko estas tre bona, sed mi permesas al mi atentigi pri malbona kalkulo de „desjatinio“. Unu desjatinio = 1.0925 hektaro, tial temis pri 0,180 kvadrataj kilometroj ne pri 180. Ni uzu la okazon por demandi, kial L. M. komencas skribi sovjeta anstataŭ soveto laŭ la Plena Vortaro. Certe laŭ elparolo devus esti sovjeto, sed laŭ grafismo soveto, kaj ni preferas en tiaj dubaj kazoj la grafismon. Se ni preferus fonetikismon, oni devus ankaŭ skribi „djesatino“ kaj ankoraŭ pli konsekvence laŭ fonetikismo „djesatjino“. Sed tia redono de elparolo estas ĉiam nur tro proksimuma kaj nepreciza. Tial ni preferas la grafismon, precipe, se la vorto jam eniris en Plenan vortaron kaj en oftan uzon, kiel soveto. Tiu kaiero de L. M. enhavas bonegan tradukon de Lukáš „Kanto pri la kala mano“, malnova poemo de Václav Šulc, kaj tre trafan recenzon de Pumpri pri Printempo de morto. Sed laŭdi en L. M. oni povas ĉiam preskaŭ ĉion. Ni tamen enskribu ankoraŭ tradukon el Puŝkin „Droninto“: Elizio estas uzita preskaŭ ekskluzive por ricevi ĉe versofinoj akcentajn rimojn kaj tamen kuras ritmo de la longa poemo ne stumblante kaj la lingvaĵo estas simpla kvazaŭ popola kiel en la originalo. — Kaj ankoraŭ: „La senco de la vivo“ de Michel Robida estas novelo de tre alta arto, multaj ekploros legante kaj ne hontos pro tio. Tiaj larmoj aŭdaciĝas.

La februaraĵoj okazintaj en Ĉeĥoslovakio estas temo de artikolo de nia membro Emil Zavadil en Internacia Kulturo el marto. Ĝi priskribas laŭvere la okazintaĵojn kaj dece kaj klare ĝi refutas malverajn kaj mensogajn sciigojn, kiuj aperis en pluraj fremdlandaj ĵurnaloj. Bona modelo kiel informi la eksterlandan publikon pri efektiva situacio. Certe oni servas al la paco per informoj respondantaj al faktoj.

La Skolta Mondo, oficiala organo de Skolta Esperantista Ligo (J. H. Wescott 29 Hawkesfield Road, Forest Hill, London, S. E. 23) aperigas unuan numeron en junio. Ĝi anstataŭas la antaŭmilitan „La Skoltan Bultenon“. 8 bele presitaj paĝoj. Al Ĉeĥoslovakio estas dediĉita el ili unu tuta paĝo. Abono 1 ŝilingo angla. Mendu ĉe Stan. Lešinger en Praha, Pankrác 356.

Sociaj klasoj kaj vivo de la nuntempaj Kanariaj Insuloj estas tre instrua artikolo en Sennaciulo (majo). Ni citas parton: „Lastatempe, post la hispana civila milito, finformiĝis du novaj kastoĵ nome: tiu de militistoj kaj tiu de la aĝiotistoj ĉe la nigra merkato. Militistoj jam de jaroj estis speciala kasto, sed nun ĝi estas privilegia. Ili havas grandajn salajrojn kaj kromsalajrojn — serĝento okaze povas havi pli altan salajron ol licea profesoro — ĝuas rabatojn ĉe preskaŭ ĉiuj pagoj, vojaĝoj, studoj de ĝefiloj ktp. — kaj havas duoblan porciĝon de porvivaĵoj en propra apartaj deponejoj, je multe pli malaltaj prezoj ol civiluloj. Ekzemple ŝuonaro de meza kvalito kostas al ordinara homo 200 ĝis 250 pesetojn; por militisto, ĉe ties propra deponejo ĝia valoro estas de 23 ĝis 25 pesetoj; vira ŝtrumpetaro de 12 ĝis 15. kaj 2 respektive. Same por manĝaĵoj kaj aliaj aferoj. Post 1939 Hispanio estas lando konkerita de sia propra armeo.“ — Poste sekvas raporto pri spekulistoj ĉe la nigra merkato. Tiu speco de friponaro estas nun internacia. Ĉu oni ne povus ankaŭ internacie kontraŭbatali tiun specon de fiĥemoj? Same kiel oni predikas kontraŭ militarismo, ĉu oni ne povus prediki kontraŭ la nigra merkato? Eble ĝi estis pli efika ol estis ĝis nun predikoj kontraŭ militarismo.

El Amazona regiono al la tutmondaj ŝesamideanoj skribas S. Augusto el Manaus, Amazonio, Brazilo, vortojn, kiujn ni reopreas pro la edifanta optimismo ne ofta dum hodiaŭaj tagoj: „Kiam mi estis en la brazila ĉefurbo,

kiun mi forlasis en 1924, mi lernis en la linceo, ke Amazonio estas kiel portugala Afriko: oni diradis, ke ĝi estis malsanulejo kaj malliberejo, kien la aŭtoritatoj forsendas la ribelulojn. Sekve de tio mia animo ricevis malbonan impreson... sed la koro ne forgesis belajn verkojn pri Amazonio.

Fine post longa tempo mia dolĉa revo realiĝis. Mi venis Manaus-on kaj sentis fali teren la malbonajn eldirojn de la aliaj. Jen mi estas en la sukoriĉa tropika arbarego apud granda rivero. Miaj okuloj ekvidis la plej belan, la plej riĉan, la plej misteran arbaron de la mondo. Mi ĝojis kaj ĝojegis. Jen, kuŝanta sur bordoj de la rivero Negro la urbo Mandaus, feino kun dolĉa kaj senfina rideto! Mi ekvidis kaj ekamis la belan havenon, belajn konstruaĵojn kaj avenuojn, ĉarmajn ĝardenojn. La loĝantoj de Amazonio estas bonkoraj kaj laboremaj. Eknaskiĝas la industrio. La zorgo pri la popolsaneco estas tia, kia en aliaj lokoj: estas sanuloj kaj malsanuloj; mi ĝis nun restis sana. Laŭ mia opinio la Amazona regiono estas ĉiam la promesita brazila regiono de la espero por la bonaj kaj laboremaj homoj." (Rio Esperantista el marto 1948.) — Estas bone legi tiajn vortojn esperigajn.

Eldonnumero de Sennaciulo, oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda, estas nun 6000 ekz. Fakte tre salutinda, ĉar Sennaciulo estas zorge redaktata kun veruo kaj intenco esti interesa kaj diri al siaj legantoj ion novan pri ideoj, por kiuj ĝi batalas. Ĝuste pro tio ni kolektas, ke pri nia lando ĝi enpresis informon, malveran.

Nova malsano. Preskaŭ ĉiuj suferas de nova malsano „inka-kaj-papera". Sajnas, kvazaŭ ĉiuj laboras en oficejoj. Ne estas miriĝe, ke ĉie mankas nutraĵoj, karbo kaj ĉio. (Heroldo de Esperanto, nro 7/1948.) (O. G.)

Imitinda aranĝo. Ni nur nun rimarkis en nov.-dec. nro de Afrika Revuo en la artikolo: Rapida skizo pri Franca Ekvatora Afriko la jenan interesan informon: En Brazaville ĉiu loĝanto pagas aŭtobus-imposton poŝare, konsekvence utiligas tiun veturilon senpage, ĉar ne ekzistas kontrolistoj en aŭtobusoj nek biletoj. Tiun imposton devas pagi ĉiu loĝanto sendiference, ĉu li utiligas aŭtobuson aŭ ne, ĉu li posedas sian aŭtomobilon aŭ biciklon. Kompreneble turistoj ŝategas tian aranĝon. Kaj simile estas pri telefono. (O. G.)

Norvegoj pri ni. La Esperantoklubo de Bergen aranĝis kunvenon 11. III. Unue la prez. faris mallongan paroladon pri Jan Masaryk, honorante lin kiel batalanton por internacia kunlaboro kaj favoranton de Esperanto. Kjell Offerdal prelegis pri la fama ĉeĥa verkisto Karel Čapek, pritraktante liajn ĉefajn literaturaĵojn. S-ro Offerdal ankaŭ kunportis esperantajn eldonaĵojn de la libroj de Čapek. (Esperantobladet, Oslo, aprilo/majo 1948.) (O. G.)

Alvokon al internacia korespondado per Esperanto de Vladimír Zima publikigas lerneja gazeto Hlas naŝi školy (Voĉo de nia lernejo), eldonata de burĝa lernejo en Kosmonosy. (O. G.)

Zamenhof en japana legolibro. En legolibro de japana lingvo, uzata en linceoj, kiun kompilis la ministerio por eduko, troviĝas ĉapitro Internacia lingvo, biografieto de Zamenhof. (Esperanto de UEA, junio 1948.) (O. G.)

RICEVITAJ LIBROJ

Kantareto. Ĉeĥoslovakaj popolaj kantoj, esperantigitaj de Jan Filip kaj Karel Filip. II-a pliiĝita eldono. 1948. Eldonis František Buhr, Praha XVIII, Bělohorská 514. Ĉeĥoslovakujo. 64 paĝoj, 13×17 cm, 45 Kčs. Havebla ĉe nia Libroservo. — La tre bele presita libro enhavas 57 popolajn kantojn en traduko de la ambaŭ aŭtoroj kun muziknotoj por ĉiuj kantoj. Elektro de la tekstoj estas tre bona, ĉar ĝi enhavas kantojn tre popularajn, el la plej popularaj verŝajne ĉiujn. Tial la libro povas servi por ĉeĥaj samideanoj, kiuj volas ĉe diversaj okazoj kanti la de ĉiuj konatajn kantojn esperantlingve. Sed la libro estos certe tre atente studata de ĉiuj muzikemaj kaj kantemaj esperantistoj eksterlandaj, kiuj volas informi sin pri la popolkantoj de nia nacio. Ili povos krei al si per tiu ĉi kolekto imagon tre ampleksan kaj tre respondecan al la efektiva stato. Precipe, kio koncernas la aŭtentikecon de la melodioj, la kolekto estas tre instrua pro la granda nombro de la kantoj kaj pro tio, ke la elektro

Presburgo. Pri skulptisto Gode el Presburgo kaj pri la alia presburga skulptisto Rössler skribas Hungara Esperantisto (majo/junio 1948) en sia priskribo de Győr. La aŭtoro de la artikolo prof. Andreo Gauder evidente ne scias, ke temas pri ĉefurbo slovaka Bratislava. (O. G.)

Ĉeĥa poemo en Brazilo. „La vivo al mi venis" poemo de Josef Sládek, tradukita el ĉeĥa lingvo de Francisco V. Lorenz, aperis en Rio Esperantista, Rio de Janeiro, en januara nro 1948. (O. G.)

Ho, ne pluru, poemo de Svatopluk Čech, tradukita de la sama Francisko V. Lorenz, estis represita en nro 5/1948 de Heroldo de Esperanto. (O. G.)

Ekspozicion pri Ĉeĥoslovakio aranĝis 9. 2. 1948 la Esperantoklubo „D-ro Zamenhof" en Hago. La pli grandan parton de la materialo (libroj, revuoj, gazetoj, afiŝoj, desegnoj, muziknotoj ktp.) sendis ĉeĥaj esperantistoj. La ĉsl. legacio en Hago disponigis fotojn kaj ses sonfilmojn pri Ĉeĥoslovakio. La materialo estis bone prezentita kaj la filmoj estis interesaj, sed la vizito estis nekontentiga. (Heroldo de Esperanto nro 5/1948.) (O. G.)

Esperanto en grekaj lernejoj. Konforme al la ministra cirkulero nro 99.727 de la 2-a de decembro 1946 la E-kursoj daŭras regule ankaŭ dum tiu ĉi lerneja jaro jene: 1. Pedagogia akademio Maraslejon 26, 2. Eksperimenta lernejo de la Universitato 18, 3. 1-a Ŝtata virina gimnazio (2 sekcioj) 94, 4. 3-a Ŝtata virina gimnazio (2 sekcioj) 127, 5. 5-a Ŝtata virina gimnazio (2 sekcioj) 101, 6. 6-a Ŝtata virina gimnazio (4 sekcioj) 170, 7. 8-a Ŝtata virina gimnazio (2 sekcioj) 66, 8. 4-a Ŝtata vira gimnazio (2 sekcioj) 45, 9. 8-a Ŝtata vira gimnazio (4 sekcioj) 232, 10. Skolta grupo de K. Patisia 18, sume 897 enskribitaj lernantoj. (Helena Esperantisto, marto-aprilo 1948.) (O. G.)

Zamenhof-stratoj en Pollando ekzistas 9: nome en Varsovio — tute detruita de la germana okupanto — en Krakovo, Łódź, Białystok, Zamoszcz, Jelenia Góra, Śródborów (somerloko apud Varsovio), Gdansk kaj Wielni. (Internacia Kulturo nro 5/1948.) (O. G.)

Subteni esperantan eldonadon en Sovetunio vi povas, se vi skribos esperantlingve al USSE, Moskva, Zubovskij bulvar, d. 21, Eldonejo de alilingva literaturo pri libroj socialistaj kaj rusaj klasikaj verkoj, kiujn vi dezirus aĉeti en esperanta traduko. Krom tio oni povas demandi esperantlingve pri katalogo de eldonataj diverslingvaj presaĵoj laŭ la adreso: Moskva, Kuzneckij most 18, eldonejo „Mejdunarodnaja kniĝa". (Laŭ alvoko de Anatol Syromjatnikov el Leningrad en Internacia Kulturo nro 4/1948.) (O. G.)

Skizoj pri Nederlando estas titolo de esperantlingva traduko de la Karel Čapek-verko Obrázky z Holandska, kiu aperos en Nederlando okaze de la SAT-kongreso en Amsterdam. (Libro-servo FLE, Roelantstraat 4, Amsterdam-West). Tion ni legas en Laborista Esperantisto el junio. Ni tre ĝojas pro tiu fakto kaj gratulas al la eldonaĵoj pro la tre bona elekto.

efektive enmetis la plej ofte kantatajn kaj plej konatajn de ĉiuj ĉeĥoj. Koncerne la tekstojn la tasko de la tradukantoj estas ĉiam tre malfacila. Kun la vortoj de popolaj kantoj estas asociitaj grupoj de tre diversaj imagoj, ideoj, intencoj, emocioj, kiujn elvokas la teksto kaj la melodio kune. Oni lernis tiujn kantojn kiel infano, kiam kreiĝis la plej subaj tavoloj de subkonscio. Oni aŭdis ilin dum la plej diversaj okazoj, kio kaŭzis pluajn asociaĵojn psikaĵojn. Iniciati per la tradukita popolkanto humoron almenaŭ iom similan al tiu, kiu estiĝas per kantado aŭ aŭskultado de la originalo ĉe la samlingvano, estas ekstreme malfacile. La aŭtoroj faris siajn eblojn. En kelkaj pecoj ili sukcesis ekzemple tre sonantaj rimojn. Ne oftan uzadon de adasismoj ni povas kompreni kiel imiton de la rimoj originalaj, kiuj estas ofte ankaŭ rimoj de gramatikaj finaĵoj, kaj al ni nun aspektas kiel rimoj tro facilaj, tre eluzitaj. Sed en la originalo ili fariĝis karaj kaj bele sonantaj pro la tradicio en ili konservita kaj

amata. Ekzemple tre bele sonas danca kanteto „Akvon portis junulin“ (ŝla panenka pro vodul), la leganto kaj deklamanto aŭdas efektivan danĉritmon kiel en originalo, kaj la esperanta lingvaĵo estas egale simpla. Kiel aldono enestas en la libro ĉeĥoslovaka ŝtata himno, ĥoralo „Sankta Venceslao“, esperantista himno kaj „Himno de la paco“, originale verkita de Jan Filip kun melodio de V. Kolský. Sur la kovrilo kaj en la libro estas bildo de Pavel Šneberger. La naciaj kantoj instigis multajn ĉefajn eminentajn pentristojn al verkoj eksterordinare belaj. Kial oni ne represis bildon de iu el tiuj ĉefverkoj?

Tiu ĉi Kantareto estas unua iom ampleksa eldonaĵo esperantlingva en nia lando post la milito. (Ĝi meritas esti legata kaj ne sole legata sed uzata de kantemuloj kaj muzikemuloj ekster nia lando. Ni ĝin sincere rekomendas al niaj eksterlandaj legantoj kaj samtempe ni petas niajn samlandanojn atentigi pri tiu grava eldonaĵo siajn amikojn eksterlandajn, kiuj certe ankaŭ estos tre dankemaj ricevinte la libreton kiel donaceton.

Banejburgo Budapeŝto. Eldonis Centra Komitato de la Termalbanejoj kaj resanigejoj de Budapeŝt (V. Molotovter 3). 16 paĝoj, 16×11 cm. — Reklama broŝuro sur luksa papero tre bele eldonita. Ni enskribas ĝin en tiun ĉi rubrikon pro tre bona teksto laŭ la enhavo kaj laŭ la lingvaĵo same.

Sep Fratoj. Rakonto de Aleksis Kivi. Eldono Vilho Setälä. Helsinki 1947. 360 paĝoj 13×17 cm. 2,60 dolaroj. — Klasika verko finna. Aperis en 1870 kaj estas la plej alta kaj daŭra rezulto de la arte kreanta spirito en la finna lando. Kivi mortis en 1872. La traduko estas farita de Ilmari Ekström kaj reviziita de la Esperanta studrondo en la Urba biblioteko de Helsinki. Krom tio la manuskripto (parte korekturojn) trastudis Stellan Engholm, W. E. Collinson, Miloš Lukáš. La lingva formo de la traduko aperas sub la respondeco de Vilho Setälä, prezidanto de la nomita studrondo. Legi tiun libron estas en nuna kriza tempo aparta ĝuo, ĉar la sortoj de la sep fratoj sur norda deklivo de altaĵo Toukola plenumiĝas dum tempo, kiam regis ordo nun al ni ŝajnanta logika kaj sistema. La fratoj vivis, luktis, petolis, ŝvitis, larmis, ploris, ridis, amis, edziĝis kaj akiris proprajn florantajn bienojn. Jen idilio el epokoj forgesataj kaj forgesitaj. Sed kia rakontisto rakontas ĝin! La sep fratoj ne estas skemoj, ili estas karakteroj ĉiu diferenca de la alia. La rakontado sufiĉe ofte estas daŭrigata kiel dialogoj inter la fratoj. La rakonto finiĝas per rakontado pri ĉiu el la fratoj aparte kaj poste finas la aŭtoro sekve:

„Kaj mi volas ankoraŭ rakonti unu kristnaskofeston en la domo de Juhani-Jukolo. Ĉar la fratoj decidis ankoraŭ unu fojon kunveni sur kristnaska pajo en sia antaŭa hejmo“ (pardonu al la ĉefa raportanto: li maljuna ankaŭ ankoraŭ memoras la belecon de pajo sur kuireja planko dum la lastaj tri karnavalaj tagoj, sed estis jam antaŭ 50—60 jaroj).

„Ili estis ankaŭ ĉiuj kunvenintaj kun siaj edzinoj kaj infanoj; kaj estis viglado en la vasta ĉambrego en Jukola, ĉar granda amaso de infanoj ludis kaj sin rulis sur susuranta pailo. Tje, ĉirkaŭ la fajrejo, sidis la grupo de la bofratinoj en ĝaja babilado, kaj la bonkreska mastrino de Kekkuri, la serioza edzino de Timo, tie dece prizorgis la laktosupan poton de Venla, kiu bolis plena je blanka ŝaŭmo. Tie ankaŭ ĉe la fajrejo estis vidata Simeoni kun psalmaro sur la genuoj, preta komenci la komunan kristnaskan psalmon. Sed en la fono ĉirkaŭ la tablo sidis la aliaj fratoj, babilante pri temoj, kiuj pasis. pri tagoj en mallumo de arbaroj kaj sur la stumpa deklivo de Impivaara, sub la ĝrota, muĝanta monto. Kaj la memoroj pri estintaj danĝeroj, bataloj kaj laboroj kunfandiĝis en ilia menso kiel kunfandiĝas arbaroj, valoj, montoj kaj altaj erikejoj en malproksima blukrepusko. Ĉio kunligiĝis en malhelan ĉarman sonĝon, kaj kvietaj silento sentiĝis en brusto de la viroj. Tiel ili rerigardis al estintaj tagoj. Same ankaŭ, aŭtunan vesperon, kiam la naturo iras al ripozo kaj flaviĝinta staras la milda foliarbaro, rigardas la paŝtisto el malproksima la karan herbdeklivon, kie li somere laboregis kaj bataladis ŝviton versante.“

Ĝi estas specimeno de tiu ĉi kristalklara stilo redonata en same klara traduklingvaĵo. Mi trovas nenion por ri-proĉi. Sole ŝajnas al mi ne rekomendinda iam troa uzado

de „je“. „Poto plena de lakto“, tiu genitivo estas tute logika, kial diri „plena je lakto“?

La tipografia aranĝo de la libro estas tre bela. Vinjetoj de Ahto Numminen ornamas ĝin tre taŭge. La libro estas efektiva ornamo de nia literaturo.

M. v. d. Horst, Tutmonda Junular-Organizo. Eldono de T. J. O.-centro en West-Grafftdijk (Nederlando). 16 pĝ 15×24 cm. Prezo 0.20 guld. aŭ 1 rpk. — Priskribo de la 10-jara historio kaj nuna stato de tiu bone laboranta organizo, plenumanta la gravan taskon altiri la junularon al nia afero kaj teni ĝin. Tion ĝi sukcesas ĉefe per sia bone gvidata gazeto La Juna Vivo. T. J. O. estas nun kunigita kun la Denaska Esperantistaro, kies membroj lernis la internacian lingvon samtempe kun sia gepatra. — Utila broŝureto! (O. G.)

Agostinho da Silva, Vivo de Nansen. Trad. Eduardo da Mota Padrão. Eld. Portugala Eldona Rondo, Porto 1948. 24 pĝ 12×17 cm. Prezo Kĉs 7.—, kompleta 6-kajera serio Kĉs 40.—. — Nova kajero de tiu popularscienca biblioteko estas same perfekta kiel la antaŭaj. Priskribita estas en ĝi vivo kaj agado de tiu eminenta norvego, kies nomo eterne brilos kiel tiu de sentima esploranto polusa kaj de oferema helpanto al mizeruloj. Estis Nansen, kiu unue riskis kaj sukcesis trapenetron de Grenlando de oriento al okcidenta bordo, estis li kun sia famiĝinta ŝipo Fram, kiu eliris en la polusan regionon por provi, ĉu la glaciario drivos lin preter la poluso denove al loĝataj regionoj, sed estis ankaŭ Nansen, kiu savis vivon kaj ekziston de milionoj da homoj. Li zorgis pri reveno de militkaptitoj post la unua mondmilito, li tiam aranĝis transloĝigon de milionoj da grekoj, turkoj kaj armenoj. Kiam rusoj malsatis, li iniciatis grandskalan helpagadon kaj kiam li ricevis por siaj bonfaroj pli rajte ol iu ajn la Nobelan premion, li dediĉis ĝin komplete al rusoj. — Lingvo sen iu makulo, tamen pri lokonomoj ni rekomendus konsulton de fidinda helpilo. Anstataŭ Khabarova (11) estis necese skribi Ĥabarovo, anstataŭ Nova Zembla (11) Novaja Zemlja, anst. Spitzberg (13 kaj aliloke) ni rekomendus aŭ Spitzbergoj aŭ la novan nomon Svalbard. (O. G.)

Jarlibro de la Universala Esperanto-Asocio. 1948. — Unua parto. Nur por uzo de membroj. UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.) Anglujo. 248 paĝoj 12×15 cm. — En konata bela tipografia aranĝo kun multaj utilaj nombroj kaj adresaro de delegitoj. Membroj de UEA estas en 70 landoj, sume 16.005. Estas videble, ke internaciaj rilatoj tamen jam reguliĝas, kvankam ilia facileco ankoraŭ ne estas tiom granda, kiom ni dezirus.



33-a Universala Kongreso de Esperanto informas, ke ĝi sendos informojn kaj raportojn pri la kongreso ĉiutage 31. 7.—7. 8. inter 16.00—16.15 horo MET (Greenwich 15.00—15.15 h.). La radiosendoj okazos laŭ mallongaj ondoj 19.80 m. aŭ 27,83 m.

Tago Erlander, la ĉefministro de Svedlando, estos honora prezidanto de la Universala Kongreso en Malmö.

Inter la novaĵoj pri la kongreso en Malmö ni sciigas, ke laŭ decido de la urbkonsilantaro de Malmö ĉiuj kongresanoj rajtos senkoste veturi per la urbaj tram- kaj aŭtobuslinioj dum la tuta kongresa semajno, kaj ke la urbo Malmö ĉiun vesperon regalos la kongresanojn per te-supeo.

Statistiko de kongresanoj: Svedujo 622, Britujo 169, Danujo 122, Francujo 118, Norvegujo 82, Finnlando 60, Nederlando 31, Ĉeĥoslovakujo 28, Svisujo 27, Belgujo 22, Hungarujo 22, Germanujo 19, Italujo 18, Usono 9, Bulgariujo 7, Aŭstrujo 6, Polujo 4, Hispanujo 3, Brazilo 3, Jugoslavujo 3, Ĉilio 2, Palestino 2, Sud-Afriko 2, Nov-Zelando 2, Argentino 1, Aŭstralujo 1, Egiptujo 1, Portugalujo 1, Rumanujo 1, Venezuelo 1, Trieste 1. — Sumo 1.389. Rezervitaj 11. Entute 1.400 el 31 landoj.

SCIIGOJ

Unua Danubvala Esperantista Konferenco okazos la 22—25-an de julio en Budapeŝt. Partoprenos reprezentantoj de la landaj Asocioj Hungaria, Rumana, Aŭstria, Jugoslavia en kadro de Balkana Kontakta Komitato, kiu ĉi-okaze transformiĝos kaj plilarĝiĝos al Danubvala Kontakta Komitato pro aliĝo de la landaj Asocioj Hungaria kaj Aŭstria. Pro la aliĝo de la Pollanda Esperanto-Asocio ankaŭ ties reprezentantoj kun egalaj rajtoj partoprenos la laborojn de la konferenco. Tiel anoncas Internacia Kulturo el mar-to. Ni aldonas, ke ankaŭ nia Asocio sendos delegitojn al tiu konferenco.

La universala kongreso 1949 okazos en Bour-nemouth (Anglio), kaj 1950 en Parizo.

Konkurso pri sporta verkajo. La oficiala or-gano de la brita Olimpia Komitato, World Sport, aranĝis konkurson, kies objekto estas verko de artikolo pri temo: »Kiel internacia inter-kompeno kaj amikeco estas akcelataj per la sporto«. La verkintoj de la plej bonaj kontri-buoj estos premiataj per senpaga restado en Londono dum la olimpiado, estante de 28-a de julio ĝis la 9-a de aŭgusto la gastoj de World Sport. Apartaj lokoj estos rezervitaj por ili en Wembley kaj ili estos ĉiel prizorgataj dum la restado.

Ni sciigis, ke sveda sporta pedagogo en la kadro de tiu konkurso kreis projekton pri sportaj konkursoj inter la junuloj de la tuta mondo, okazontaj dum aparta »Tutmonda sporta tago«, kaj donis detalan planon pri la aranĝo de tiaj konkursoj.

Se oni deziras kapti grandiozajn arojn da partoprenantoj devas esti plenumataj la jenaj kondiĉoj:

La konkursoj okazu en la hejmloko, koncernu limigitan nombrojn da simplaj sportaj branĉoj,

ebligu kiel eble plej justan taksadon de la rezultatoj. Por tia taksado la proponinto ellaboris poentan tabelon.

La »Tutmonda sporta tago« devas laŭ la propono esti aranĝata de UN. La venkintoj ricevu diplomon en Esperanto, subskribitan de la regnestroj de la landoj reprezentataj en la konkursoj.

La verkinto montras en sia propono, ke la realiĝo de tiaj internaciaj konkursoj postulas forigon de unu obstaklo: la lingva diverseco.

Tiun obstaklon superas nur unu alia faktoro: la manko de volo de la homoj uzi la lingvon de alia nacio en internacia kunlaboro.

Sed tiu obstaklo malaperos en tiu momento, kiam akceptos la projektita »sporta komitato«, laboranta sub la egido de UN, Esperanton kiel oficialan lingvon por internaciaj sportaj interrilatoj. Ne nur teorie, sed ankaŭ praktike la internacia Esperanto-movado montriĝis la plej efika porpaca organizo de la mondo. Se la internacia sport-movado povos efike sin servi de la mondlingva movado, oni gajnos multe pli grandan profiton por la tutmonda paco ol sukcesis atingi ĝisnunaj packongresoj. Nur la sporta movado tiam montros sin potenca faktoro por la akcelo de internacia interkompreno kaj amikeco inter la junuloj de ĉiuj landoj, al kiuj paco sur la tero devas aperi la plej kirindaĵo de la vivo.

Bulgario. La 31-a kongreso de bulgaraj esperantistoj okazos dum la somero en urbo Jambol. La loka Esperanto-societo »Maksim Gorki« vigle laboras por fari ĝin unu el la plej belaj kaj plej bone organizitaj ĝis nun kongresoj. Estos organizataj objektloterio kaj ekspozicio. Pro tio Jambola societo turnas sin al ĉiuj esperantaj asocioj kaj al ĉiuj individuaj esperantistoj kun la peto, ke ili sendu al la kongreskomitato esperantaĵojn k. aliajn objektojn por tiuj entreprenoj. Adreso: Esperanto-societo »Maksim Gorki«, Jambol, Bulgario.

SAT-peranto por Ĉeĥoslovakio estas nun J. Kollmann, Dunajská 84, Bratislava.

Aŭstria Esperantista Federacio okazigos sian kongreson nunjaran en Linz a. d. D. la 12—15-an de aŭgusto 1948. Adreso de la kongres-komitato: Karl Nigl, Prinz-Eugen-Str. 11, Linz a. d. D., Aŭstrio.

Esperantajn glumarkojn duspecajn (kun bildo de piramidoj kaj surskribo en lingvoj araba kaj esperanta, kun bildo de Zamenhof kun araba surskribo) eldonis Dro Tadros Migalli, P. B. 1914, Cairo, Egipto. Li liveras 100 diversajn markojn por 3 respondkuponoj.

Oprava. Na str. 39 v levém sloupci, 25. řádek zdola, má být idiotická místo idistická.

Na str. 58 v překladu 16. textu má být v 6. řádku za slovem centprocente čárka. V řádku 7. má být senkompromise.

Z redakce. Protože v rámci obecných směrnic o šetření papírem zmenšilo nám ministerstvo informací příděl, má toto číslo jen 8 stran, stejně jako budou mít čísla další až do doby, kdy bude příděl papíru zase zvětšen na původní množství.

Karolo Piĉ:

ĜIS LA REVIDO, MANJO!

*Vi venis, vi malvenas,
kara fratino mia;
kaj plore poststretrenas
ĝistarevido via.*

*Jam sonas tajfsignalo!
Svinge mi vin salutas...
Kaj poste intervalo,
kaj — mi jam persekutas*

*Mi restas ĉe malplena,
dezerta retoparo;
kaj per la koro svena
mi pensas kun amaro:*

*La lasta vagonaro
pasis kaj estas for...;
ĉirkaŭe januaro...;
enkore nokt' kaj plor'*

*La vagonar' atendas...
Ĝi tulgonigre fumas...
(Kaj vane vi etendas
brakojn kaj min brakumas)*

*nur bildon de la trajno,
kiu en serpentumo
foriĝas, trompa ŝajno!
malantaŭ sia fumo...*

*Jen la homvivo: Vana
atendo ĉe tervojo,
dum postvesper' malsana,
dum ĝena hundobojo...*

*kaj terurega scio:
Neniu trajno plu
sur tiu ĉi linio
aperos el vaku'...!*

INFORMOJ DE NIA LIBROVENDEJO

Ciam ankoraŭ daŭras la situacio, dum kiu ni ne povas akcepti mendojn por eksterlandaj eldonaĵoj (gazetoj, libroj, anoncoj).

Ni povas liveri tuj la sekvantajn malnovajn gazetojn por la notitaj prezoj, al kiuj ni aldonas la efektivan afrankon:

Svenska Esperanto-Tidningen La Espero, Stockholm 1932: nro 12; 1933: 6, 9—12; 1934: 1, 2, 4—11; 1935: kompl.; 1936: 1—5, 8—10, 12; 1937: 1, 2, 4, 8, 9, 11, 12; 1938: 1—7, 9—12; 1939: 1—5

Kĉs 30.—

Esperanto bladet Norvega Esperantisto, Oslo 1934: 4; 1937: 8; 1938: 4, 5

Kĉs 4.—

La Juna Vivo 1935 I: 18, 21, 25, 27, 28; 1936 II: 10—15; III: 1—3, 5, 6; 1937 III: 9, 10, 12; IV: 5, 6; 1938 IV: 8—12; V: 1, 4—8; 1939 V: 7—12; VI: 2—3

Kĉs 20.—

Ĉielarka standardo. Internacia kooperativa gazeto. Warszawa. 1936: 4-5; 1937: 1-2

Kĉs 5.—

Internacia Radio-Revuo, Paris 1926-27: 1-2, 13-14

Kĉs 5.—

Hispana Esperanto-Gazeto, Madrid 1935: 44, 49—51, 53, 54; 1936: 56—59, 61

Kĉs 6.—

La Progresanto, Amsterdam 1938: 1, 4, 7—9, 11, 12; 1939: 2, 3

Kĉs 4.—

Oriente, Ĥarbin. Nro 1 (sume aperis 2 nroj) 116 pĝ. Interesa kaj valora enhavo.

Kĉs 25.—

Laborista Esperantisto, Amsterdam 1934: 2, 3; 1935: 8; 1936: 1; 1937: 1, 4, 5, 7, 8; 1938: 8, 12; 1939: 5

Kĉs 8.—

Arbetar Esperantisten — Laborista Esperantisto, Oslo 1937: 6—8; 1940: 4

Kĉs 3.—

Sennaciulo 185, 451, 454, 463, 465, 468, 470

Kĉs 6.—

La Vojo, monata gaz. por inf., Amsterdam 1936: 8, 11; 1938: 5, 11, 12; 1939: 1—3

Kĉs 4.—

La Suda Stelo, Slovanski Brod 1934: 8; 1937: 5, 6; 1938: 4

Kĉs 4.—

Per Unuigitaj Fortoj, Paris 1937-8: 1, 3—5

Dr K. Absolon, Moravia Karsto. Abismo Macoĥa kaj la grottoj. Trad. J. Blahoslav. Eld. Esperantista klubo en Brno. 42 pĝ 13×17 cm, multaj ilustraĵoj.

Kĉs 10.—

Granda kolekto de Heroldo de Esperanto (antaŭe Esperanto Triumfonta) kun la diversaj aldonoj: Revuo, Internacia Komercio, Lingva Kritiko ktp. La kolekto konsistas el sekvaj numeroj:

22, 23, 28, 38, 41—52, 54—144, 146—165, 167—172, 174—198, 200, 201, 203—205, 209 (duona)—238, 240—245, 247—257, 259—275, 277, 295—299, 301—328, 333, 334, 359, 360, 362—368, 373—375, 377—388, 390—395, 397, 445—466, 495, 500, 501, 503—505, 507, 513, 518—524, 529, 530, 534, 535, 537—610, 612—629, 631, 674 (duona)—709, 711—719, 911, 935—937, 945, 948, 949, 953, 966, 968, 969, 973—975, 1016. Prezo de la kolekto 500 Kĉs. Krome estas haveblaj diversaj unuopaj numeroj.

ESPERANTISTA VIVO

Stanislav Otruba, lernejestro e. p. en Těšetice u Olom., ĝisvivis 80 jarojn (naskiĝis la 7-an de majo 1868 en Biskupství). Li estas unu el la plej malnovaj esperantistoj el la pionira periodo de ĉeĥa movado, kiam en j. 1908 estis fondata Bohema Asocio Esperantista. En tiu jaro li partoprenis la Dresdenan kongreson. En la sama jaro li komencis korespondadon kun B. E. Long en Londono, kiu daŭras seninterrompe ĝisnun. Samideano Otruba estu salutita elkore!

NAĜE ĤEĈ, jarkolektoj XXIV—XXVI (1941 ĝis 1943), estas serĉataj por pago aŭ intersanĝe por esperanta literaturo. Se vi mem ne posedas, bonvolu demandi ĉe vialoka librovendisto. Proponojn sendu al EAĈSR, Praha XIX, Uralské 9.

KORESPONDI DEZIRAS:

Ni bedaŭras, ke ni estas devigataj presi sekvajn du informojn:

F-ino Saurin, Villa Clémence-Isaure — 2 Av. Désambrois (Nice), ricevis pro enpresado de sia adreso en tiu ĉi rubriko pli ol 60 kartojn kaj leterojn, al kiuj ŝi ne povas respondi, ĉar ŝia adreso aperis sen ŝia scio.

L. Vandembrielle, 18, Groenestraat, Boezinge (Fl. Occ.), Belgio, dankas al multegaj ĉeĥaj samideanoj, kiuj skribis al li. Pro la granda amaso da leteroj kaj manko de tempo, li ne respondis al multaj leteroj. Li ne povas akcepti pliajn korespond-rilatojn kaj petas pardonon pro tio kaj salutas ĉiujn.

Nia klarigo. Ni publikigas en tiu ĉi rubriko adresojn de fremdlandaj esperantistoj, kiuj petis pri tio, opiniante, ke ni kompleze servas al ili kaj al niaj legantoj same. Okazas, ke iam ni ricevas iun adreson de nia leganto, kiu asertas, ke li estis petita zorgi pri publikigo de la adreso. Ĉar aperis, ke iu leganto sendis al ni adresojn de samideanoj, kiuj ne petis pri tio, ni publikigos de nun sole adresojn de tiuj, kiuj sendos ilin kun subskribita deklaro, ke ili respondos al ĉiu veninta propono.

Zbigniew Zapert, Witściwiera 27m 2, Warszawa, Polando (kun skoltj).

Gdr Niels Sorensen, Lerjerggaard, Thyregod, Danlando (pri bahaa movado kaj pri terkulturo).

A. Ĉernjachovski, ul. Sofia 10, Sliven, Bulgario (intersanĝi poŝmarkojn prefere en registr. leterojj).

Rees Perry, 93 Henry St., Tighes Hill, Newcastle, N. S. W., Aŭstralio, dez. korespondi kun lokomotivestro aŭ alia fervojisto ĉeĥoslovaka.

Sooĵi Sugaja, 579 Johana, Tojama-ken, Japanujo, 20-jara gimnazia studento, serĉas junajn geesperantistojn por interkorespondo pri scienco, filozofio, arto kaj religio.

Jiří Gibl, Nová radnice, I. etaĝo 175, Ostrava I, serĉas en- kaj eksterlandajn interesulojn pri orĥideoj kaj pri ilia kulturado.

La Nova Kristanismo, bazita sur la doktrino de sveda sciencisto kaj reformatoro Em. Swedenborg, enportas certan lumon en la homan animon pri la postmorta vivo kaj pri la vera religio, bazita sur la Biblio kaj ĝia interna senco. Informas: Jan B. Vlach, Lužická 21, Praha XII. ifj. Abrahám Miklós, tramvoĵisto, Vöröshadsereg útja 4/b, II. 6, Budapest XII.

Evĝeni Aĉanov, str. Kiril i Metodi 162, Sofia — kun tramvoĵistoj.

Kun junaj ĉeĥoslovakaj esperantistoj deziras korespondi:

F-ino Carmen Pastoret, 19-jara;
Moise Pastoret, 24-jara;
f-ino Renée Maso, 17-jara;
f-ino Marie-Rose Cufi, 17-jara.

Adreso de ĉiuj kvar estas la sama: Rue Chambon, Le Boulou, Pyr.-Ortles, Francio.



Turné francouzské operní pěvkyně Mme Marguerite Santreuil po ĈSR. Esperantský spolek v Olomouci připravuje na druhou polovinu září t. r. turné význačné francouzské pěvkyně, samideánky Marguerite Santreuil, která koncertovala loni na světovém esperantském kongrese v Bernu. K uspořádání koncertu přihlásilo se již 7 esperantských klubů v Čechách a na Moravě, další kluby mohou se přihlásit ještě do konce července. Podmínky jsou výhodné: opatření stravování, ubytování a úhrada jízdného do příštího místa vystoupení. Přihlášky zasílejte na adresu: Esperantský spolek v Olomouci, který Vám ochotně sdělí další informace.